Raporto laŭ la punkto 7.3.7. de la Statuto:

# Raporto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI por 2022

**Nomo kaj mallongigo en Esperanto:** Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI

**Nomo kaj mallongigo nacilingve:** Verband Deutscher Esperanto-Lehrer e.V., / VDEL

**Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:** 1968, nova statuto, nova registriĝo: 2006

**Jura statuso:** jes (registrita asocio ĉe juĝejo en Hannover, Registergericht, 04.07.2006)

**Rilato kun Landa Asocio de UEA:** jes sendependa faka asocio de GEA

**Rilato kun Landa Asocio de TEJO:**

ne oficiale, praktike en informinterŝanĝo, reciproka partopreno en eventoj

**Membro-nombro en 2022:** 55 45 paperaj, 7 retaj, (1 DM, 1 HM)
3 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrokotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 55 membrojn.

**Rajtigitaj komitatanoj por 2022:** 4
Zsófia Kóródy
Dr. Rudolf Fischer
Christof Krick
Martin Ptasinski

**Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:**

Oficiala hejmpaĝo: jes
Oficiala ret-adreso: http://esperanto.de/agei

Ĉu via sekcio havas retgrupon: jes

**Revuo sekcia:**

jes, porokaza cirkulero, ĉ. 2-4 foje jare

**Enlanda membrokotizo:** jes

**Nuna estraro de la sekcio:**

Zsófia Kóródy, prezidanto
Dr. Rudolf Fischer, vicprezidanto
Christof Krick, kasisto
Martin Ptasinski, estrarano

=== ***agado*** ===

**Propraj aranĝoj dum 2022:**

Pro la pandemio malcertis ion propran aranĝi en la unua duono de la jaro. Ni planis organizi la tradician Torpedo-n (Pedagogiajn Tagojn) en oktobro, sed ĝi ne okazis, pro manko de sufiĉaj aliĝintoj.

**Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:**

1. AGEI tradicie havas sian jarĉefkunvenon dum la Germana Esperanto-Kongreso. En 2022 GEK okazis denove en ĉeesta formo, en Oldenburg. Tamen, ni ebligis ankaŭ virtualan partoprenon al tiuj, kiuj ne povis partopreni.

La AGEI kunsido dum GEK estas publika, do bona forumo por ĝenerala informado pri instruagadoj. Kiel kutime, reprezentantoj de Interkultura Centro Herzberg, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy informis pri instruado de Esperanto per modernaj metodoj kaj pri denove planataj klerigofertoj de la Esperanto-Centro en Herzberg.

2. La sepan fojon estis organizita somera intensa Esperanto-kursaro (Semajnoj de Esperanto-Perfektigo - SEP) en kunlaboro kun Esperanto-Centro Herzberg. Ĝi estis dusemajna kaj internacia. Post la antaŭtagmezaj instruhoroj la kursanoj manĝis kune kaj organizis posttagmezajn vizitojn en la ĉirkaŭaĵo, vizitis muzeojn, ekskursis en la arbaro, testadis promenvojojn en la Harz-montaro.

La programon riĉigis kulturaj kaj muzikaj eventoj, kantado, rakontado, prelegoj kaj prezentadoj. La partoprenintoj havis la eblon renkontiĝi, paroladi kun lokaj klubanoj.

Kelkaj partoprenantoj venis por spertiĝi pri instruado, mem gvidis lecionojn kaj elpensis taskojn por la kursanoj. Por ili estis la ŝanco sub faka gvido provi siajn „flugilojn".

3. Kiel jam tradicie, ankaŭ en 2022 kunvenis la reprezentantoj de landaj ligoj kaj fakaj asocioj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) en Herzberg am Harz. Delegitoj raportis pri la agado de GEJ kaj de la landaj kaj fakaj asocioj en Germanio. Pri la agado de AGEI raportis Zsófia Kóródy.

**Propraj projektoj dum 2022:**

AGEI kaj Interkultura Centro Herzberg (sub gvido de Peter Zilvar) daŭre kunlaboras kun la t.n. Landa Plenkreskula Kleriginstitucio (Ländliche Erwachsenenbildung, LEB https://www.leb-niedersachsen.de). Jam la sepan jaron daŭras tutjara kurs- kaj klerigprogramo kun variaj temoj, prelegoj, prezentadoj. De la pandemio ĝi okazas en virtuala formo, en la regulaj mardvesperaj "Buntaj Vesperoj", ĉiusemajne anoncitaj ĉe http://eventaservo.org. La agnosko far LEB estas grava atingaĵo, kiu ebligas montri la kulturperantan, edukan rolon de la internacia lingvo Esperanto.

**Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:**

AGEI subtenas la projekton „1 leciono pri Esperanto". La materialo estas havebla en pluraj lingvoj kaj atingebla sur la retpaĝaro de AGEI en menupunkto Biblioteko aŭ rekte per http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=83839799

AGEI kunlaboras kun la edukorganizaĵo edukado.net, kiu kolektas kaj disponigas sur sia hejmpaĝo http://edukado.net kolektejon de Esperanto-kursoj, diskutforumon, prezentadon de lernolibroj kaj grandan virtualan arkivon de instruhelpiloj, didaktikaj materialoj.

AGEI ne mem listigas Esperanto-kursojn en Germanio, sed alvokas ĉiujn gekolegojn registri siajn kursojn kaj detalojn pri la instruado ĉe la komuna registrejo de edukado.net.

**Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:**

Ankaŭ en 2022 ni alvokis gekolegojn utiligi la programkajerojn de Popolaltlernejoj (VHS), kiuj atingas vastan publikon. Estas ĝojige, ke pli kaj pli ofte lokaj kluboj, instruantoj aperigas tie siajn Esperanto-kursofertoj. Eĉ se poste ne realiĝas kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, tamen la legantaro estas informita pri Esperanto kaj ekscias pri uzebloj de la lingvo.

AGEI-novaĵoj aperadas en la gazeto de GEA Esperanto aktuell, dissendiĝas per dissendolistoj, retpaĝoj, Facebook, ktp. Alvokoj por membriĝo okazas dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg.

**Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:**

AGEI regule kunlaboras pere de pluraj siaj instruistoj kun popolaltlernejoj (Volkshochschule-VHS). En kelkaj urboj ankaŭ en 2022 aperis anoncoj kaj eĉ okazis Esperanto-lingvokursoj.

AGEI subtenas gekolegojn per kolektado kaj modelcela aperigo de varbtekstoj por tiuj VHS-kajeroj ĉe http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

**Konata E-instruado en via teritorio, praktike en kiom da lernejoj/universitatoj estas kursoj de Esperanto kaj kiom da kursoj ĉeestaj aŭ retaj okazas en via lando?:**

Pri lerneja Esperanto-instruado bedaŭrinde malmultaj informoj alvenadas. Pro la pandemio ne ĉi kaj ĉiam okazis ĉeesta instruado kaj malfacilas enkonduki novajn lernejajn kursojn, fakrondojn. Kelkaj aktivaj instruistoj pensiuliĝis, junaj ne aktivas en lernejoj. En la universitato de Emden regule okazas Esperanto-kursoj.

Kursoj kaj klerigcelaj kunvenoj okazadas en pluraj federaciaj landoj, urboj, ekz. en Hamburg, Frankfurt, Stuttgart, Münster, Berlin, Hameln, Neubrandenburg. Okazis VHS-kurso en Frankfurt am Main, kaj ankaŭ funkcias la reta kurso ellaborita de Dr. Rudolf Fischer: Esperanto en dialogo https://agei.esperanto-urbo.de/netzkurs.

Estas ĝojiga la regula kursoferto de GEJ ekz. dum GEK, la t.n. KEKSO (Kreema Esperanto-Kurso) por komencantoj, kun laborrondoj kaj feriotempaj ofertoj.

**Aliaj agadoj en 2022:**

AGEI daŭre kunagas kun Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) por la ordigado, pliriĉigo de la Biblioteko en Herzberg am Harz, kie okazas tutjara programo, multaj kunvenoj, kursoj kaj klerigseminarioj, do la biblioteko servas publikan intereson. Ofte estas serĉataj tie literaturaj verkoj, lernolibroj, vortaroj, instruhelpiloj kaj metodikaj libroj.

La pedagogia, metodika fakkolektaĵo estas specialaĵo de tiu biblioteko. Ĝi estas je dispono por partoprenantoj de la klerigseminarioj, metodikaj kursoj kaj verkantoj de faklaboraĵoj.